


# tejo tutmonde

tutmonda esperantista junulara organizo

## TEJO havas novan estraron


Ekkonu la novajn estraranojn kaj komisiitojn,  
kiuj nun respondecas pri nia organizo.



**Intervjuo kun  
la nova TEJO-  
volontulino**

**Kandidatiĝu  
kiel komi-  
tatano B**

**Aliĝilo por la  
ĉi-jara IJK  
en Hungario**



**Karaj legantoj!**

Jen la unua numero de 2008, kiu espereble alvenas bonorde ĉe ĉiuj TEJO-membroj. Ĝi ja enhavas gravajn informojn pri la organiza vivo de la asocio: Krom la sinprezentoj de la novaj estraranoj kaj komisiitoj, aperas alvoko al kandidatiĝo por

la TEJO-komitato kiel B-komitatano. La B-komitatanoj reprezentas la individuajn membrojn de TEJO, kaj ĉiu membro povas kandidatiĝi. Do se vi estas aktiva esperantisto kaj ŝatus kundefidi pri TEJO, pripensu mem kandidatiĝi!

Krome vi povos legi intervjuon kun la nova TEJO-volontulino Julia NOE kaj raporton pri la pasinta komitatkunsido de TEJO dum la IS en Würzburg. En la rubriko TEJO-membroj ĉi-foje sin prezentas unu membro el Togo.

Agrablan legadon!

Marcos

**Enhavo**

Estraraj bondeziroj por 2008 .....3

Sinprezentoj de estraranoj kaj komisiitoj .....3-5

Kandidatiĝu kiel Komitatano B .....6-7

Rubriko TEJO-membroj .....7

Informoj pri kaj aliĝilo por la ĉi-jara IJK .....8-13

La komitatkunsido de TEJO dum la IS en Würzburg .....14-15

Intervjuo kun la nova TEJO-volontulino Julia NOE .....16-17

Kandidatiĝu por la 65-a IJK en 2009 ...18

Kontakt-informoj kaj informoj pri TEJO .....19

Kalendaro pri Esperanto-aranĝoj .....20

**Ne forgesu rekotizi!**

Jes, jam alvenis la tempo por remembrigi en TEJO (aŭ re-patroniĝi) por 2008. Bonvolu frue rekotizi por ke via ricevado de *Kontakto* kaj *TEJO Tutmonde* ne estu interrompita. Ne forgesu ke, krom ricevado de la interesaj kaj informplenaj TEJO-revuo, via membreco rajtigas vin ricevi rabaton je la partoprenkotizo de la IJK (kiu en 2008 okazos en Hungario)! Memoru, TEJO estas via asocio - helpu ankaŭ vi ke ĝi estu forta kaj aktiva en 2008! Kontaktu la Centran Oficejon, aŭ aliĝu rete ĉe: [www.uea.org/alighoj](http://www.uea.org/alighoj)

**Limdato por 2008:3 – 15-a de majo 2008!**

TEJO Tutmonde estas dumonata oficiala gazeto de TEJO pri la junulara Esperanto-movado. Ĝin ricevas ĉiuj individuaj membroj kaj patronoj de TEJO. Landaj junularaj Esperanto-organizoj povas ricevi ĝin.

Kontribuojn sendu (prefere) rete al [tejo-tutmonde@tejo.org](mailto:tejo-tutmonde@tejo.org) (per normala mesaĝo aŭ kiel kunsendita tekst-dosiero), aŭ paperpoŝte al la adreso: TEJO Tutmonde (Marcos CRAMER), Nürnberger Straße 27a, 04103 Leipzig, Germanio. Fotojn/bildojn sendu kiel JPEG. **Viaj kontribuoj estas bonvenegaj kaj necesaj!**

Aliaj Esperanto-gazetoj rajtas publikigi artikolojn el TEJO Tutmonde kondiĉe ke ili mencias la fonton.

Redaktisto: **Marcos CRAMER** (Germaniujo). Demandojn pri membrecoj, abonoj, distribuo ktp. sendu al: TEJO, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando; rete: [oficejo@tejo.org](mailto:oficejo@tejo.org). Presado: SKONPRES, Bydgoszcz, Polujo; rete: [skonpres@poczta.onet.pl](mailto:skonpres@poczta.onet.pl). **La redaktisto kaj la eldonanto ne respondecas pri la opinioj de unuopaj aŭtoroj.**

## Estraraj bondeziroj por 2008

Kara membro de TEJO!

Venis nova jaro, elektiĝis nova estraro de TEJO, enkondukitis nova simbolo de TEJO, sed restas daŭre la sama misio: Nin ligas bona ideo (jes, Esperanto!) kaj ni ŝatus ĝin komuniki al kaj disvastigi tra la mondo; ni estas vigla movado kaj ŝatus pliprofundigi la ligojn inter ni...

Unue ni volas kore danki al David-Emil WICKSTRÖM, Chuck SMITH, François HOUNSOUNOU, Haris SUBAŠIĆ, Katja IGNATIEVA kaj Valentina SIDOROVA kiuj dum la pasintaj du jaroj estris nian movadon, kaj ni esperas daŭrigi ilian bonan laboron.

Unu el la plej gravaj personoj de TEJO estas la volontulo. Dum la pasinta jaro Kasia MARCINIAK volontulumis en *Nieuwe Binnenweg 176* kaj forte kontribuis al la vivtenado de TEJO – *multan dankon* pro via laboro! Intertempe ŝi iĝis oficisto de UEA kaj tiel kontribuas al la plifortigo de la ligoj inter TEJO kaj UEA. Ni gratulas kaj ĝojas! Ekde decembro, Julia NOE estras la oficejon de TEJO en la tegmenta etaĝo de la Centra Oficejo, kaj ni kore bonvenigas ŝin!

Kiuj estas niaj planoj kiel nova estraro? Unuflanke, ni ŝatus sukcese pludaŭrigi kaj pluevoluigi la kernajn aktivecojn de TEJO – la IJK, la organizado de seminarioj por trejni junajn aktivulojn, la publikaĵoj de TEJO. Aliflanke, ni volas trovi novan manieron alfronti la plej grandan defion en la kontakto al la „ekstera mondo“ – kaj iniciati novajn komunikstrategiojn por prezenti la motivojn kaj valoron de niaj aktivecoj. Tiucele, ni klopodas starigi laŭeble grandan internacian reton de aktivuloj kun novaj ideoj – kaj ni esperas baldaŭ raportiri pri novaj akcentoj metotaj.

Nome de la tuta estraro, ni kore salutas vin kaj antaŭĝojas nian internaciisman komunecon. Ĝis revido en la Internacia Junulara Kongreso 2008 en Szombathely (aŭ pli frue!).

Plej amike,

Anna-Laŭra WICKSTRÖM (Ĝenerala Sekretario)

Gregor HINKER (Prezidanto)

## Sinprezentoj de estraranoj kaj komisiitoj

**Gregor HINKER, prezidanto kaj respondeculo pri eksteraj rilatoj**

*Loĝloko* – Vieno

*Naskiĝtago* – 20-a de majo 1981

*Profesio/studfako/viva okupo* – Studento pri maŝin-inĝenierado kaj muzikscienco

*Ĉefaj aktivaĵoj/intereso* en la movado – Antaŭe: Sensukcese klopodis finvenki en Aŭstrio.

Nuntempe: Eksteraj rilatoj kaj internaj

neŭrozoj de TEJO  
*Ŝatokupoj* – Muzikumi (ĉefe pasive), bicikli (prefere longdistance), publika transporto kaj trajnoj  
*Kion vi volas atingi (dum via oficperiodo)?* – Plukrei retojn al la "ekstera mondo"



kaj komuniki bildon de TEJO kia ĝi estas: internacia senlima reto de junuloj plena da kreivo kaj energio.

**Anna-Laura WICKSTRÖM, ĝenerala sekretario**

*Loĝloko* – Monteto en Svislando

*Naskiĝtago* – 21-a de julio 1980

*Profesio/studfako/viva okupo* – Instruas matematikon en universitato kie mi doktoriĝas, kromstudas pri politiko, socio kaj lingvoj de suda azio.



*Ĉefaj aktivajoj/intereso en movado* – Internaciaj rilatoj; enkonduki Esperanton en kampoj kie ĝi estas inda ilo.

*Ŝatokupoj* – La kutimaj kaj nekutimaj aferoj

*Kion vi volas atingi (dum via oficperiodo)?* – Vigligi na TEJO sen finvenkista troigo

**Sergeo TYRIN, kasisto**

*Loĝloko* – Be'er-Ŝeva, Israelo

*Naskiĝtago* – 3-a de junio 1984

*Profesio/studfako/viva okupo* – Studento de matematiko kaj informadiko en Universitato Ben-Gurion

*Ĉefaj aktivajoj/intereso en la movado* – Ekster TEJO mi estas vic-redaktoro de la revuo "Israela Esperantisto", fojfoje ludas en esperantlingvaj teatraĵoj kaj de tempo al tempo ŝatas distri min per tradukado.

*Ŝatokupoj* – Vojaĝoj, legado de malenuaj libroj, biciklado...

**Vildana DELALIC, respondeculo pri kongresoj (IJK)**

*Loĝloko* – Sarajevo, Bosnio kaj Hercegovino

*Naskiĝtago* – 13-a de aprilo 1982

*Profesio/studfako/viva okupo* – Studentino de telekomunikadoj en Univeristato de Sarajevo

*Ĉefaj aktivajoj/intereso en la movado* – Nuntempe, krom esti TEJO-estrarano mi estas sekretariino de Esperanto-ligo de Bosnio kaj Hercegovino kaj prezidantino de Studenta Esperanto-klubo de Sarajevo; mi interesiĝas pri disvastigado de Esperanto kaj amikiĝo per Esperanto.

*Ŝatokupoj* – Mi ŝatas vojaĝi, legi, spekti malnovajn filmojn kaj amikumi kun geamikoj dum longaj vintraj noktoj...

*Kion vi volas atingi (dum via oficperiodo)?* – Mia celo estas plifaciligi preparojn de TEJO-aranĝoj al organizantoj per miaj konsiloj kaj spertoj, kaj ankaŭ igi ĉiun novan aranĝon pli bona kaj neforgesbla ol antaŭan...



**Rogener PAVINSKI, respondeculo pri landa agado**

*Loĝloko* – Ribeirão Preto, Brazilo

*Naskiĝtago* – 4-a de aprilo 1981



*Profesio/studfako/viva okupo* – Filmisto/  
muzikisto

*Ĉefaj aktivaĵoj/intereso* en la movado –  
Kulturo

*Ŝatokupoj* – Vojaĝi, spekti filmojn,  
muzikumi

*Kion vi volas atingi (dum via  
oficperiodo)?*

Plibonigi la kontakton kaj informfluan  
inter Landaj Sekcioj kaj TEJO

**Felix ZESCH, komisiito pri amas-  
komunikiloj kaj publikaj rilatoj**

*Loĝloko* – Berlin, Germanio

*Naskiĝdato* – 1983 en Leipzig, Germanio

*Profesio/studfako/viva okupo* – Doktorig-  
anta esploristo en logistika konsilfirmao

*Ĉefaj aktivaĵoj/intereso* en la movado –  
Internaciaj rilatoj; enkonduki Esperanton  
en kampoj kie ĝi estas inda ilo

*Ŝatokupoj* – Aikido, ŝako

*Kion vi volas atingi (dum via  
oficperiodo)?* – Kiel estro de la  
Komisiono Pri Amaskomunikiloj kaj  
Publikaj Rilatoj (KAPRi) mi estas  
profunde konvinkita, ke por sia estonta  
agado TEJO bezonas profesi-aspektan kaj  
altkvalitan aperon por la ekstera mondo.  
Antaŭvideble estos pli da realviva  
kontakto kun aliaj ne-Esperantaj  
organizaĵoj kaj tial TEJO ne nur bezonas  
bonan retpaĝaron, sed ankaŭ senhonte  
d disponeblajn informilojn. Tion mi volas  
certigi kune kun la komisionanoj.  
Alia parto de mia agado estos la instigo  
de landaj sekcioj pri disponigo de siaj  
informiloj al la aliaj landaj sekcioj, tiel ke  
bonaj ideoj povas esti kopiataj kaj  
disvastigataj en aliaj landoj. Por tio indas  
revivigi la retan informcentron (RIC), kio  
atingeblas kunlabore kun la komisiono pri  
reta informado.

*Ĝisnuna movada  
aktiveco*

- 2001 Redak-  
toro de la mem-  
brogazeto de la  
Germana Espe-  
ranto-Junularo

- 2002-2005  
Prezidanto de la  
Germana Espe-  
ranto-Junularo

- 2005 TEJO-  
komitatano A  
por Germanio



## Kandidatiĝu Por Komitataneco B de TEJO

**Venis la tempo por kandidatiĝi kiel Komitataro B de TEJO por la oficperiodo de la 1-a de junio 2008 ĝis la 31-a de majo 2010.**

La Komitato estas la supera instanco de TEJO, kies taskoj estas difini ties ĝeneralan agadon, elekti Estraranojn kaj decidi pri ilia agado, aprobi la buĝeton kaj decidi pri reglamentoj. Ĝi konsistas el Komitatoj A, Komitatoj B, Komitatoj C kaj la Estraranoj de TEJO. La Estraranoj estas elektitaj en ĉiu malpara jaro, kio okazis antaŭnelonge dum la Internacia Seminario 2007 en Würzburg (Germanio). La cetero de la Komitato estas elektata en ĉiu para jaro. Ĝia nova oficperiodo estos de junio 2008 ĝis majo 2010. Komitatojn A nomumas Landaj kaj Fakaj Sekcioj de TEJO ĝis la 30-a de aprilo de ĉiu para jaro. Komitatoj B reprezentas individuajn membrojn de nia organizo. Kaj fine, la Komitatojn C elektos la jam elektitaj Komitatoj A kaj B.

Ĉiu individua membro de TEJO rajtas elekti sian reprezentanton en la TEJO-

Komitato. Kaj same – ĉiu individua membro de TEJO rajtas kandidatiĝi kiel Komitataro B kaj tiel rekte kundecidi en la Komitato pri gravaj okazaĵoj en la Organizo. Ĉi-foje oni rajtas elekti maksimume 4 Komitatojn B.

Por eniri la Komitaton estas bonvenaj aktivuloj de Landaj Sekcioj aŭ lokaj grupoj, kiuj per sia laboro pretas kontribui al la funkciado kaj evoluo de la Organizo.

Por ke via kandidatiĝo estu valida, bonvolu sendi al la Centra Oficejo aŭ al la Ĝenerala Sekretario de TEJO la jenajn informojn:

- personajn datumojn (nomon, naskiĝ-daton, retroŝtan kaj paperpoŝtan adresojn, telefonnumeron)
- biografieton kaj priskribon de viaj Movadaj celoj. Grandeco de la teksto devas ne superi 100 vortojn.
- subtenleterojn aŭ subtenajn subskribojn de minimume kvin individuaj membroj de TEJO el minimume du landoj.


Ne forgesu subskribi vian kandidatiĝon, se ĝi estas paperpoŝta! Sen iu el la menciitaj eroj kandidatiĝo ne estos valida! Via kandidatiĝletero devas alveni plej laste la 15-an de majo 2008.

Uzu la jenajn adresojn:

- paperpoŝte: TEJO, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
- retroŝte: [oficejo@tejo.org](mailto:oficejo@tejo.org);

[gxen-sek@tejo.org](mailto:gxen-sek@tejo.org)

- Detalajn informojn rilate la kandidatiĝon kaj elekton de la Komitatoj B vi povas trovi en la "Regularo pri TEJO" kaj en la "Reglamento pri elekto de Komi-



tatanoj B". Ilin vi povas trovi en la reto ĉe [www.tejo.org/aktivuloj/regularo/regularo.php](http://www.tejo.org/aktivuloj/regularo/regularo.php). Paperan version mendu ĉe la TEJO-volontulo en la CO laŭ la supre menciita adreso. Se vi havas iujn demandojn, ne

hezitu kontakti la TEJO-volontulon aŭ la Ĝeneralan Sekretarion.

Anna-Laura H. WICKSTRÖM  
Ĝenerala Sekretario de TEJO

## Rubriko TEJO-membroj

En ĉi tiu rubriko, ĉiu TEJO-ano povas prezenti sin. Se vi ankaŭ volas aperi en la rubriko, sendu viajn respondojn al la subaj demandoj al la [tejo-tutmonde@tejo.org](mailto:tejo-tutmonde@tejo.org).

### - Kiel vi nomiĝas?

AGBOLO Efoé Agbénányi.

### - De kiu lando vi venas, kaj kie vi nun loĝas?

Mi naskiĝis en Togolando kaj nun mi loĝas en Lomé, ĉefurbo de Togolando. Mi estas togolandano.

### - Kiom da jaroj vi havas?

Mi havas 25 jarojn.

### - Kiel vi esperantistiĝis?

Mi esperantistiĝis la 19-an de Januaro 2000 en la klubo Pacbatalantoj. Nun mi estas la vic-sekretario de JOTE (Junulara Organizo de Togolandaj Esperantistoj); mi aktivas en UTE (Unuiĝo Togolanda por esperanto). Mi estas ankaŭ membro de UEA, TEJO kaj aliaj organizoj. Mi interesiĝas pri lingvoj kaj ĉio, kio utilas por la evoluo de la mondo.

### - Kiujn ŝatokupojn vi havas?

Jes ja, miaj ŝatokupoj estas Esperanto, Interreto, sporto kaj literaturo...

Mi multe uzas Esperanton en mia ĉiutaga vivo, ĉar en Togolando loĝas multaj esperantistoj – pli ol 300 aktivaj esperantistoj en nia landa asocio. Ankaŭ ĉiuj miaj geamikoj estas esperantistoj.

Pri interreto: mi multe uzas reton por esperantaj aferoj, interalie mi tre sincere korepondadas kun s-ino Nubia LETSEN el Brazilo, kiu jam lanĉas novan projekton.



Ŝi volas helpi al gekomencantoj kiuj volas lerni E-on pere de reto; tial ŝi kreas du blogojn:

[www.zamenhofagalerio.blogspot.com](http://www.zamenhofagalerio.blogspot.com)

[www.ceciljakajesperanto.vip-blog.com](http://www.ceciljakajesperanto.vip-blog.com)

Eble interesiĝantoj povus viziti ilin. Tiuj blogoj eble helpas al viaj gefiloj, genepoj aŭ lernantoj ellerni la lingvojn.

Mi multe ŝatas legi francajn, anglajn kaj esperantajn librojn. Mi ŝatas sporton kaj piedpilkadon.

### - Kio estas via vivdevizo?

Ŝanĝon por la mondo kaj pacon por la homaro.

## La komitatkunsido de TEJO dum la IS en Würzburg

Dum la pasinta Internacia Seminario kiu okazis ĉirkaŭ novjaro en la sudgermana urbo Würzburg kunsidis la komitato de TEJO. Ĝi estis tre grava komitatkunsido, ĉar jam pasis unu kaj duona jaro post la lasta kvoruma kunsido kiu okazis dum la IJK en Sarajevo. Dum la IJK en Hanojo (Vjetnamio) la kunsidon ne ĉeestis sufiĉe da komitatanoj por ke ĝi estu decidpova laŭ la statuto de TEJO. Tio estis tre malkonvena situacio, ĉar 2007 estis elekta jaro, en kiu estintu elektita nova estraro.

Dum la novjara periodo okazas paralele al IS ankaŭ aliaj Esperanto-renkontiĝoj. El tiuj la Ago-Semajno en Pollando altiras plej multe da junuloj. Por certigi ke la kunsido dum IS estu kvoruma la komitatanoj, kiuj decidis ĝui la AS-on anstataŭ la IS-on aŭ pro aliaj kialoj ne povis esti en Germanio, estis petataj serĉi anstataŭanton en IS. Dum la aŭtuno en la komitatlisto okazis ankaŭ diskuto pri okazigo de videokonferenco por profiti de la ĉeesto de komitatanoj en ambaŭ IS kaj AS. Bedaŭrinde evidentiĝis ke laŭ la statutoj nur validas la ĉeestantoj en unu fizika loko por kalkuli la kvorumon. Komence de la kunsido oni do unue kalkulis kiom da komitatanoj ĉeestis kaj kiom da transdonitaj voĉoj ili reprezentas. Feliĉe la rezulto estis ke entute 19 el la 28 komitatanoj estis reprezentataj, pli ol duono, do ke la kunveno estis decidpova.

La plej grava punkto en la agendo de la kunsido estis kiel jam dirite la elekto de la nova estraro de TEJO por la periodo 2007-2009. Verŝajne en alia loko de ĉi tiu numero de TEJO Tutmonde la novaj

estraranoj sin prezentas. Mi do ĉi tie nur mencios iliajn nomojn kaj la voĉdonrezultojn.

Nova Prezidanto de TEJO estas Gregor HINKER (18 poraj voĉoj, 1 kontraŭa), nova Ĝenerala Sekretario estas Anna-Laura H. WICKSTRÖM (19 poraj voĉoj, 0 kontraŭaj), nova Kasisto estas Sergej TYRIN (19 poraj voĉoj, 0 kontraŭaj). Krome estis elektitaj kiel membroj de la estraro Rogener PAVINSKI (18 poraj voĉoj, 1 kontraŭa) kaj Vildana DELALIC (19 poraj voĉoj, 0 kontraŭaj).

Post la sukcesa elekto de la nova estraro oni elektis la novan Elektan Komisionon (EK). La tasko de tiu komisiono estas serĉi kandidatojn por la sekvaj elektoj en 2009. En la EK por 2009 membras Chuck SMITH kaj Marcos CRAMER.

Dum la komitatkunsido ne nur estas parolata pri la estraro. La plej alta organo de TEJO kompreneble ankaŭ kunvenas por pridiskuti la agadon de TEJO. Por pli efike diskuti pri diversaj temoj samtempe la komitatanoj estas disigitaj en tri grupojn. La tri grupoj diskutis pri:

**- TEJO-informiloj kaj informstrategio kaj kion fari okaze de la UN-jaro de multlingveco 2008**

Kia estu la varbada kaj informa strategio de TEJO kaj kiujn ilojn ni volas uzi?

**- Reglamento kaj Statuto de JEBUO**

La Junulara Esperantista Burundia Organizo volas iĝi Landa Sekcio de TEJO. Antaŭ aprobi tion la komitato devas zorge kontroli la statuton kaj reglamenton.



## - Reformoj de la Reglamento kaj Regularo de TEJO

Chuck SMITH proponas kelkajn ŝanĝojn pri reta voĉdonado kaj la (re)ŝanĝo de la kvorumo por komitatkunsido de duono al triono.

Por la resto de la unua tago la komitatanoj partoprenis unu el la tri laborgrupoj.

En la dua tago oni komencis per la prezento de la rezultoj de la laborgrupoj.

La laborgrupo pri varbado kaj informado kreis bonajn ideojn pri interalie:

novaj broŝuroj de TEJO; dulingva IJK por pli malfermi ĝin al lokuloj kaj havigi al ili la sperton de Esperantorenkontiĝo; koncentrita varbado ĉe celorganizadoj kiel la Ruĝa Kruco kaj la Skolta movado.

La laborgrupo kiu pristudis la leĝajn dokumentojn de JEBUO trovis kelkajn plibonigendaĵojn en ĝi kaj pro tio konsilis al la komitato ankoraŭ ne akcepti JEBUO-n kiel Landan Sekcion. La komentojn ili komunikos al JEBUO kaj kiam ili estas aplikataj JEBUO verŝajne povas esti akceptata dum la venonta komitatkunsido kiu okazos dum la IJK en Szombathely.

La tria laborgrupo pri Reglamentaj kaj Regularaj reformoj proponis kelkajn ŝanĝojn pri kiuj oni voĉdonis. La unua propono estis la reŝanĝo de la kvorumo de komitatkunsido. Antaŭ kelkaj jaroj oni ĝin ŝanĝis de triono al duono de la komitatanoj. Pro la neokazo de kunsido



La partoprintoj de la TEJO-kunsido

en Hanojo kaj malfacilaĵoj atingi kvorumon en Würzburg oni nun decidis reiri al triono. Dua propono de la laborgrupo temis pri reta voĉdonado. La grupo verkis novan parton de la Reglamento pri ĝi kiu estis akceptita. Krome la komitato taskigas al la estraro pli praktike ellabori la proceduron.

La lasta punkto en la agendo de la kunsido estis la prezento de la laborplano de la nova estraro. Mi esperas ke ili ankaŭ ĝin prezentas en ĉi tiu numero de TT do mi ne prezentas ĝin ĉi tie. Poste venis ankoraŭ kelkaj ceteraĵoj antaŭ la fermo de la komitatkunsido. Tuj post la fermo de la efika kaj fruktodona kunsido estis farata komuna foto de ĉiuj ĉeestintoj kaj poste ni ĉiuj povis ĝui la reston de la IS.

Nico HUURMAN, komitatano A por la Nederlanda Esperanto-Junularo

## Intervjuo kun la nova volontulino de TEJO

- *Saluton Julia! Rakontu iom pri vi mem!*

- Mi estas Julia Noe el Germanio, 28-jaraĝa kaj studis komunikadon kaj amas-komunikilojn (bakalaŭre) kaj kulturajn sciencojn (magistre).

- *Kiel kaj kiam vi esperantistiĝis?*

- Mi esperantiĝis en 1998 kaj do ĉijare havas 10-jaran jubileon. Mi lernis en semajnfina kurso en Heidelberg (Germanio) la gramatikon kaj preskaŭ ĉion sen lerni komprenis, ĉar mi jam scipovis la anglan, francan kaj latinan kaj mian gepatran lingvon, la germanan. Poste mi sekvis dum duona jaro konversacian kurson por lerni novajn vortojn kaj esprimojn. Oktobre mi partoprenis gastronomian semajnfino en Alzaco, Francio, kaj tie mi estis invitita partopreni IS en Kassel. Post tiu IS mi flue parolis Esperanton kaj ne plu volas malhavi Esperanton kaj ĉiujn amikojn, kiujn mi trovis pere de ĝi intertempe.

- *Ĉu vi jam antaŭe aktivis en la*



*Esperanto-movado? Se jes, kiel?*

- Post unu jaro en Esperantujo mi aktivis kaj helpis en la estrara komisiono pri loka kaj landa agado en Germanio. Mi kunordigis la tutlandajn kaj regionajn Esperanto-kursojn. Ekde 2000 mi daŭrigis tion kiel estraranino pri loka kaj landa agado ĝis la fino de 2006. Ekde 2002 mi helpis en la organiza teamo de IS. Unue mi respondecis pri invitleteroj kaj ekde 2005 pri la administrado.

- *Kial vi decidis volontuli en la Centra Oficejo?*

- Mi aŭdis dum FESTO 2007 pri la volontula loko de Kasia, kiu varbis dum sia prelego. Mi iomete intervjuis ŝin kaj tralegis la varbafiŝon de TEJO kaj decidis, ke tio estus interesa por mi, ĉar mi tiel povus ligi miajn profesiajn spertojn el mia studado kun mia hobia Esperanto. Dua kaŭzo estas, ke per mia studfako oni ne havas tiel bonan ŝancon tuj ricevi bone pagitan laborlokon kaj pere de la volontulado, mi iomete povas transponti la tempon.

- *Kion vi volas fari por TEJO?*

- Mi sekvas la regulojn de la organizo, funkciigas ilin bone; kontribuas al ordigado de la TEJO-arkivo kaj kontribuas al disvastigo de informoj pri Esperanto. Mi uzas mian vivsperton dum laboro por la TEJO-oficejo.

- *Kiaj estas viaj ĝisnunaj impresoj pri la TEJO-laboro, la Centra Oficejo ĝenerale, viaj kolegoj, la oficeja etoso kaj la vivo en Roterdamo?*

- Mi ŝatas mian ĝisnunan laboron en la CO (Centra Oficejo). Ĝis nun la laboro estis ĉefe sekretaria laboro, sed dum la

venontaj monatoj mi verŝajne ankaŭ reprezentos TEJOn dum Esperantorenkontiĝoj per prelego pri TEJO kaj TEJO-budo kun informmaterialoj. La Centra Oficejo bone funkcias kaj ni bone kunlaboras kaj kafopaŭzas kune. Dum la semajnfinoj mi uzas la tempon por esplori Roterdamon. Mi trovis jam kelkajn belajn kvartalojn, kiujn mi certe denove vizitos dum la someraj monatoj, ĉar nuntempe mi nur havas la impreson en mallumo. Ege impresa estas ankaŭ la arkitekturo. Do post la milito multe da arkitektoj alvenis en la detruitan Roterdamon kaj konstruis sian personstilan kvartalon, kiun oni ĝis

nun vidas, kaj oni ankoraŭ ne finis la konstruadon.

- *Ĉu vi volas lerni la nederlandan lingvon vivante nun en Nederlando?*

- Jes, mi jam iomete komencis lerni per podkasto (interreta radio) per la angla al la nederlanda kaj fine de la monato mi komencos kurson kun instruisto en popola universitato de Roterdamo. Ĝis nun mi ĉefe uzas la anglan aŭ svedan ekster la CO, sed mi pensas, ke estus pli ĝentile minimume iomete lerni la nacian lingvon. La nederlanda estas la 11a lingvo, kiun mi komencas lerni. Kvar mi parolas jam flue krom mia gepatra lingvo.

## ***lernu!*** kvinjara

La 21a de decembro 2007 estis la kvina datreveno de lanĉiĝo de *lernu!* ([www.lernu.net](http://www.lernu.net)), la plej granda kaj uzata retpaĝaro por lernado de Esperanto. Por marki tion, la teamo de *lernu!* kolektis interesajn informojn pri la projekto: bildojn, fotojn, kaj intervjuojn kun la prizorgantoj kaj uzantoj de la paĝaro. Ĉiuj kolektitaj informoj troveblas ĉe [lernu.net/pri\\_lernu/informiloj/artikolo.php](http://lernu.net/pri_lernu/informiloj/artikolo.php).

La paĝaro *lernu!* nun havas version ankaŭ en la araba. Pri tiu versio kunlaboris *lernu!*-anoj el Jordanio, Usono, Israelo kaj Saŭd-Arabio. Libera Folio publikigis intervjuon kun Erinja PIATESKI, kiu estas unu el kernaj



teamanoj de *lernu!*. La intervjuon vi povas trovi ĉe la TTT-adreso [liberafolio.org/2007/arabalernu-1](http://liberafolio.org/2007/arabalernu-1).

Laŭ E@Info - numero 4



**tejo**

**IJK**  
**2009**

**KANDIDATIĜU POR LA 65-a**  
internacia junulara kongreso



**ĈU VI ŜATAS ESPERANTISTOJN?**  
**ĈU VI ŜATAS ESPERANTO-RENKONTIĜOJN?**  
**ĈU VI ŜATUS ILIN ĈIUJN INVITI AL VIA**  
**LANDO?**

SE VI POZITIVE RESPONDIS AL LA SUPRAJ  
DEMANDOJ VI EBLE PRETAS POR LA PLEJ  
GRANDA DEFIO POR LANDA SEKCIO DE TEJO:  
**O R G A N I Z I I J K - n**

IJK estas la plej grava evento de TEJO. Ĉiujare ĝi kunigas centojn da junuloj el la tuta mondo kiuj dum unu semajno komune amuziĝas kaj seriozas, diskutas kaj ridas, laboras kaj festas.

Ĝi estas grava eblo por prezenti nin kaj niajn ideojn al la "ekstera mondo", por eniri la amaskomunikilojn kaj atingi vastan publikon.

La limdato por kandidatiĝi estas la 31a de marto 2008!  
Por pli da informoj, skribu al: [vildana@tejo.org](mailto:vildana@tejo.org)  
Informigu ĉe: <http://www.tejo.org/node/12>

**tejo**

TEJO - Tutmonda Esperantista Junulara Organizo  
[www.tejo.org/oficejo@tejo.org](http://www.tejo.org/oficejo@tejo.org)

## Ĝeneralaj informoj pri TEJO

TEJO estas mallongigo de *Tutmonda Esperantista Junulara Organizo*. Ĝi estas la junulara sekcio de UEA, la *Universala Esperanto-Asocio*.

TEJO popularigas internacian kompreniĝon per renkontiĝoj, edukaj programoj kaj uzo de internacia lingvo, Esperanto.

La organizo defendas kulturalan riĉecon de lingva diverseco, homajn rajtojn de lingvaj minoritatoj kaj tutmondan kompreniĝon per facila aliro al internaciaj kontaktoj. Uzo de Esperanto estas kadro de niaj klopodoj.

Retadreso: [www.tejo.org](http://www.tejo.org)

## Centra Oficejo de UEA/TEJO

Nieuwe Binnenweg 176  
NL-3015 BJ Rotterdam  
Nederlando

Tel.: (010) 436 1044  
Faksilo: (010) 436 1751,  
Retadreso: [uea@co.uea.org](mailto:uea@co.uea.org)

## Estraro de TEJO

• Gregor HINKER (Prezidanto, Eksteraj Rilatoj)  
Schelleingasse 54/24, 1040 Wien, Aŭstrujo  
Retadreso: [gregor@tejo.org](mailto:gregor@tejo.org)

• Anna-Laura H. WICKSTRÖM (Ĝenerala Sekretario)  
Universitätsstr. 57, 8006 Zürich, Svisujo  
Retadreso: [annalowa@gmail.com](mailto:annalowa@gmail.com)

• Vildana DELALIĆ (Seminarioj kaj aktivula trejnado)  
A.B. Šimića 5, Sarajevo 71000, Bosnujo-Hercegovino  
Retadreso: [vildana.delalic@hotmail.com](mailto:vildana.delalic@hotmail.com)

• Sergej TYRIN (Kasisto)  
P.O.K 15092, Be'er Ševa 84120, Israelo  
Retadreso: [interdist@gmail.com](mailto:interdist@gmail.com)

• Rogener PAVINSKI (Landa agado)  
Av. Lafaiete Costa Couto, 1447  
Ribeirão Preto - SP - Brazilo - 14060-450  
Retadreso: [rogener@tejo.org](mailto:rogener@tejo.org)

## Membroservoj de TEJO

Kiel membro de TEJO vi ricevas:

- la gazeton TEJO Tutmonde
- la revuon Kontakto
- rabaton por la Internacia Junulara Kongreso kaj la Internacia Seminario
- eblecon partopreni en seminarioj
- eblecon havi blogon ĉe [tejo.org](http://tejo.org)
- eblecon involviĝi en interesa kaj internacia agado

Kaj tre grave: vi helpas al la junulara movado de Esperanto!

Se vi aĝas pli ol 30 jarojn kaj volas ĝui la samajn avantaĝojn (kaj revuojn) kiel membroj de TEJO, kaj aldone subteni TEJO-n, vi estas bonvenigata fariĝi Patrono de TEJO. (Pliaj informoj sur [www.tejo.org/patrono](http://www.tejo.org/patrono) aŭ de la Centra Oficejo).

## Agado de TEJO

La agado de TEJO konsistas precipe el:

- informado en junularaj medioj pri la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj pri ĝia solvo per Esperanto
- praktika utiligo de Esperanto je la servo de la junularo kaj informado pri tio en junularaj medioj
- okazigo de kongresoj, konferencoj, seminarioj kaj aliaj kunvenoj
- instigado al la membroj de TEJO aktive partopreni en la esperanta movado.
- Aktivula Trejnado (pli da informoj ĉe [www.tejo.org/aktivula\\_trejnado](http://www.tejo.org/aktivula_trejnado))
- Eldono de Pasporta Servo, la adresaro de gastigantoj kiuj pretas senkoste gastigi Esperantistojn; ĉiujare aperas ĝisdatigita eldono.

## Subtenu la agadon de TEJO

Ekzistas multe da eblecoj helpi TEJO-n en sia agado. La plej gravaj estas membriĝi aŭ patroniĝi. Sed vi ankaŭ povas helpi al konkretaj agaderoj de TEJO. Mondonacojn al ĝenerala agado de TEJO bv. pagi al la UEA-konto "tejtej" (indiku celon de donaco, ekz: "donaco por KER" aŭ "donaco por landa agado"). Ankaŭ eblas donaci tiel por specifaj celoj:

- Fonduso "Partoprenu IJK-n" – TEJO per ĝi subvencias la partoprenon de TEJO-aktivuloj al IJK
- Pasporta Servo – eble la plej fama eldonaĵo de TEJO

Por pliaj detaloj pri pagmanieroj, bv. rigardi ĉe [www.uea.org/alighoj/pag\\_manieroj.html](http://www.uea.org/alighoj/pag_manieroj.html) aŭ demandi ĉe la Centra Oficejo.

TEJO dankegas vin pro via subteno!

### marto - majo

14-16: Iberia renkontiĝo en Benicassim ĉe Valencio (Hispanujo), organizata de la Portugala, Hispana kaj Kataluna Esperanto-Junularoj.

Rete: [esperanto.cat/ir2008](http://esperanto.cat/ir2008)

19-25 marto: 32-a Internacia Junulara Festivalo (IJF) en Senigallia, Italujo. Temo: "2008 – Internacia Jaro de la Lingvoj: defioj kaj perspektivoj". Rete: [tej.esperanto.it/ijf/2008](http://tej.esperanto.it/ijf/2008)

4-20 aprilo: 26-a Printempa Semajna Seminario de la Asocio de Esperantistoj-Handikapuloj kaj la E-rondeto en Ml. Boleslav en Skokovy, hotelo ESPERo, Ĉeĥujo.

Inf: [Drahotovaesperanto@seznam.cz](mailto:Drahotovaesperanto@seznam.cz)

11-14 aprilo: Mezorianta esperantista renkontiĝo en Amano, Jordanio.

Inf: [araba.komisiono@esperanto.org](mailto:araba.komisiono@esperanto.org)

1-5 majo: 9-a Meksika Esperanto-Kongreso en Aguascalientes, Meksiko. Rete: [www.webmei.org](http://www.webmei.org)

1-11 majo: 20-a Esperanto-festivalo "Aroma Jalto" en Jalto, Ukrainujo. Rete: [ulej.org.ua/aj](http://ulej.org.ua/aj)

### julio

11-18: 7-a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto (TAKE) en Montrealo, Kanado. Temo: "Ekosistemoj, lingvoj, kulturoj: diverseco por daŭropova evoluigo en la Amerikoj". Rete: [www.take7.ca](http://www.take7.ca)

12-19: 9-a Kultura Esperanto-Festivalo (KEF) en la ĉarmega urbo de Hamlet (almenaŭ de lia kastelo): Helsingør en Danujo. Rete: [kef.saluton.dk](http://kef.saluton.dk)

19-26: 93-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Roterdamo, Nederlando. Temo: "Lingvoj: trezoro de la homaro".

Rete: [www.uea.org/kongresoj/uk\\_2008.html](http://www.uea.org/kongresoj/uk_2008.html)

26 julio – 2 aŭgusto: 64-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) de TEJO en Szombathely, Hungarujo. Temo: "Minoritataj rajtoj – individuaj kaj kolektivaj". Rete: [tejo.org/ijk](http://tejo.org/ijk)

### aŭgusto

1-17: SOMERE - Somera mezeŭropa renkontiĝo en Kall-Krekel, Germanujo. Ĉefa celgrupo: Familioj. Rete: [esperantoland.org/somere](http://esperantoland.org/somere)

2-8: MIRO (Magiverda Internacia Renkontiĝo) en Duga Resa, Kroatujo. Venu amuziĝi en belega verda naturo. Rete: [keja.hr/miro\\_e.html](http://keja.hr/miro_e.html)

2-10: 16-a Memzorga Lagumado (MELA) en vilaĝo Délegyháza, 34 km sude de Budapeŝto, Hungarujo. Libere sen aŭ kun vestaĵoj ripozi, akvo- aŭ ŝlimbani. Rete: [krokodilo.de/mela/mela.php](http://krokodilo.de/mela/mela.php)

10-15: Nacia Kongreso de la Unuiĝo de Malagasaj Esperantistoj (UME) en la marborda urbo Vatomandry en Malagasujo (Madagaskaro). Okazos ankaŭ sesio de Internacia Ekzameno Baza Nivelo kun relernado komence de aŭgusto en Antananarivo. Rete: [fidilalao@yahoo.fr](mailto:fidilalao@yahoo.fr)

17-24: FESTO 2008 en Lyon (Francujo), organizata de la Junulara Esperantista Franca Organizo (FESTO). Temo: Minoritataj lingvoj. Rete: [esperanto-jeunes/festo](http://esperanto-jeunes/festo)

### septembro - decembro

4-7 septembro: Berlina Arbara Renkontiĝo, Aŭtuna BARo 2008 en Bad Mündler, Germanujo. En la arbaro, tial ideala por familioj kun etaj infanoj. Rete: [krokodilo.de/baro/baro.php](http://krokodilo.de/baro/baro.php)

19-21 septembro: Artaj Konfrontoj en Esperanto (ARKONES) en Poznań, Polujo. Paralele kun ĝi okazos studadsesio de lingvistiko en Esperanto ĉe Universitato Adam Mickiewicz. Rete: [arkones.org](http://arkones.org)

7-9 novembro: Konferenco Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST 2008) en Dobřichovice, Ĉeĥujo. Rete: [kava-pech.cz/kaest](http://kava-pech.cz/kaest)

27 decembro – 3 januaro: 52-a Internacia Seminario (IS) en Biedenkopf, Germanujo. Junulara aranĝo kun kvalita programo. Rete: [esperanto.de/is](http://esperanto.de/is)

**Plena kalendaro de Esperanto-eventoj: [eventoj.hu/kalendar.htm](http://eventoj.hu/kalendar.htm)  
Kalendaro, al kiu ĉiu povas mem aldoni Esperanto-aranĝojn: [mondakalendaro.org](http://mondakalendaro.org)**